

**ŜIAJ PEKOJ ESTAS MULTAJ; SED ĈIUJ ESTAS PARDONITAJ,
ĈAR ŜI EGE AMIS.**

El la evangelio laŭ Luko 7, 36 – 8, 3

Komento al la Eangelio di p. Alberto Maggi OSM

En tiu tempo unu el la fariseoj invitis Jesuon manĝi kun li. Jesuo eniris en lian domon, kaj sidiĝis ĉetable. En tiu vilaĝo troviĝis pekulino. Kiam ŝi eksciis, ke Jesuo estas en la domo de la fariseo, ŝi alportis alabastran vazon da parfuma oleo; ŝi genuiĝis malantaŭe ĉe la piedoj de Jesuo kaj plorante komencis priverŝi Liajn piedojn per siaj larmoj; poste ŝi viŝis ilin per la haroj de sia kapo, kisadis ilin kaj ŝmiris ilin per sia parfumo. La fariseo, kiu invitis Jesuon, vidante tion, pensis en si: „Se Li estus vere profeto, Li sciis kiu kaj kia virino Lin tuŝas: ŝi estas pekulino!“

Tiam Jesuo diris al li: „Simon, Mi havas ion por diri al vi.“ Kaj li diris: „Majstro, parolu.“ „Iu havis du ŝuldantojn: unu ŝuldis al li kvincent denarojn, kaj la alia nur kvindek. Sed neniu el la du havis eblecon redoni al li la monon. Tiam li pardonis al ambaŭ iliajn ŝuldojn. Kiu el ili do pli amas lin?“ Simon respondis: „Tiu, mi supozas, kiu ricevis pli grandan favoron.“ Kaj Jesuo diris al li: „Vi juĝis prave.“ Kaj Sin turnante al la virino, Li diris al Simon: „Ĉu vi vidas tiun virinon? Mi eniris en vian domon, kaj vi ne donis al Mi akvon por la piedoj, sed ŝi lavis miajn piedojn per siaj larmoj kaj viŝis ilin per siaj haroj. Vi ne salutis Min per kiso; sed ŝi ekde mia eniro ne ĉesis kisadi miajn piedojn. Vi ne ŝmiris mian kapon per oleo, kaj ŝi ŝmiris miajn piedojn per sia parfumo. Pro tio Mi diras al vi: ŝiaj pekoj estas multaj; sed ĉiuj estas pardonitaj, ĉar ŝi ege amis. Kaj al kiu oni malmulte pardonas, tiu malmulte amas.“ Poste Jesuo diris al ŝi: „Mi pardonas al vi viajn pekojn.“ Tiam tiuj, kiuj sidis ĉe la manĝo

kun Li, komencis diri inter si: „Kiu Li estas, ke Li eĉ pardonas pekojn?” Sed Jesuo diris al la virino: „Via kredo savis vin: iru en paco!”

Kaj post nelonge Li vojiradis tra urboj kaj vilaĝoj, predikante kaj anoncante la ĝojan mesaĝon de la regno de Dio. Estis kun Li la dek du disĉiploj, kaj iuj virinoj, kiuj estis liberigitaj de malbonaj spiritoj kaj malsanoj. Inter ili Maria, nomata Magdalena, el kiu Jesuo forigis sep demonojn; Johana, edzino de Ĥuzas, administranto de Herodo, Susana kaj multaj aliaj, kiuj helpis al ili per siaj havaĵoj.

Nur en la evangelio de Luko ni renkontas tiun epizodon tiel konsternan, en kelkaj punktoj ŝokan. Estas tiu la sola proksima renkonto de Jesuo kun prostituitino. Ni legu el la evangelio.

“*Unu el la fariseoj...*” Ni ja scias, kio estas la fariseoj. Laŭ la rakonto de Luko, ili estas uloj, kiuj taksas sin, pro siaj meritoj, pro la sankteco de sia vivo, la plej proksimaj al Dio. La signifo de fariseo estas “apartiĝinta”, ulo kiu, per observado de reguloj kaj preskriboj, tenas sin aparte de la aliaj homoj por proksimigi sin al Dio. Do la plej proksima al Dio, kiu poste aspektos la plej malproksima.

“*...invitis Jesuon manĝi kun li. Jesuo eniris en lian domon, kaj sidiĝis ĉetable*”. Kial la fariseo, de ĉiuj konata kiel kontraŭulo de Jesuo, Lin invitas al manĝo? Probable por evidentigi publike, ke ĉe li Jesuo ne estas honora gasto.

Sed Luko nin surprizas nun.

“*En tiu vilaĝo troviĝis pekulino. Kiam ŝi eksciis, ke Jesuo estas en la domo de la fariseo, ŝi...*”

Nun okazas io neatendita, eĉ neatendebla. Laŭ la tieaj tiamaj kutimoj la bankedoj estis rezervitaj al la viroj. La inoj restis en la kuirejo, ili ne aperis en la manĝoĉambro eĉ por servi ĉe la tabloj: tiun taskon ili lasis al la viraj

idoj. Do ĉeestis nur viroj. Kaj kiaj viroj! Ili estis fariseoj, kies ĉefa zorgo estis la ideo pri pureco, la ideo pri respekto de la reguloj permesantaj la proksimecon al Dio.

Antaŭ ol rakonti, kion ŝi estas faronta, Luko tuj asertas, ke ŝi estas "pekulino", kiu "troviĝis en tiu vilaĝo". Do la sceno estas konsterna: en la salonon de la bankedo abrupte eniras virino, virino ne pura ĉar pekulino, kiu senhonte enportas la ilojn de sia metio "..." *alportis alabastran vazon da parfuma oleo;...*, per kiu ŝi kutimis ŝmiri siajn klientojn.

Ne sufiĉas. "ŝi genuiĝis malantaŭe ĉe la piedoj de Jesuo kaj plorante komencis priverŝi Liajn piedojn per siaj larmoj;..." "La ino, kiel ni vidos en la sekvo, esprimas sian senliman dankon pro la pardono, kiun ŝi sentas jam ricevita de tiu Jesuo, kiu predikadis pri Patro bonvola al la sendankuloj kaj la malbonuloj.

Sed estas ankoraŭ io.: "...; poste ŝi viŝis ilin per la haroj de sia kapo..." Nekredeble! Tiam la ino, ekde kiam ŝi iĝis knabino kaj ĝis la vivofino, neniam montris la kapon kaj la harojn publike: nur hejme, al la edzo kaj al la gefiloj. Se edzino montris siajn harojn, tio povis esti pravigo por eksedziĝo. La haroj neplektitaj aspektis kvazaŭ erotika invito. Tion rimarkis Holofernes, malamiko de Izraelo, kiam li venigis al si Judit, judan heroinon. Kiel ŝi perdigis al li la prudenton, (kaj poste la kapon)?, Malplektante siajn harojn (Jud 10, 3).

Do la sceno iĝas erotika. Kaj ankoraŭ ne venis la fino: "... ", *kisadis ilin kaj ŝmiris ilin per sia parfumo.*" Do tiu buŝo de prostituitino kisas la piedojn de Jesuo! Tiu spektaklo estas tro frapa por la fariseo, la piulo, la obeanto de ĉiuj reguloj: fine, li elverŝas sian malestimon!

Luko, kiu ĝis nun parolis nur pri la ino, turnas sian atenton al la dommastro: "La fariseo, kiu invitis Jesuon, vidante tion, pensis en si: „Se Li estus vere profeto,..., La malestimo klare vidiĝas en tio, ke li ne alparolas Jesuon per Lia nomo, kaj li esprimas dubon, ke lia gasto estas profeto: certe li ne aspektas tia..." *Li sciis kiu kaj kia virino Lin tuŝas: ŝi estas pekulino!*" Cetere, Luko mem raportis, kelkajn frazojn antaŭ la hodiaŭa teksto, ke pri Jesuo iuj diris "jen manĝegulo kaj vindrinkulo, amiko de impostistoj kaj pekuloj". Kaj la invitinto aliĝas al tiu opinio. Rimarku ankaŭ la uzon de la verbo "tuŝi", kiu estis uzata ankaŭ por aludi al seksaj rilatoj. Sume, la fariseo

interpretas la konduton de la ino kiel tenton, kaj lia konkludo povis esti nur, ke "ŝi estas pekulino".

Kaj nun Luko turnas sian atenton al Jesuo kaj al Lia reago "Tiam Jesuo diris al li: „Simon (Jesuo uzas la nomon de la fariseo), Mi havas ion por diri al vi". La respondo de la fariseo estas hipokrita: "Kaj li diris: „Majstro, parolu.". Kaj Jesuo rakontas mallongan parabolon: "Iu havis du ŝuldantojn: unu ŝuldis al li kvincent denarojn, kaj la alia nur kvindek. Sed neniu el la du havis eblecon redoni al li la monon. Tiam li pardonis al ambaŭ iliajn ŝuldojn. Kiu el ili do pli amos lin?". La denaro estis la hora salajro de laboristo, do unu ŝuldis proksimume du-jaran salajron, la alia du-monatan. La respondo estas facile divenebla.

La fariseo verŝajne flaras insidon, li ŝajnas malcerta pri sia respondo, li nur "supozas" pri ĝi: " Simon respondis: „Tiu, mi supozas, kiu ricevis pli grandan favoron." Kaj Jesuo diris al li: „Vi juĝis prave."

Nun Jesuo riproĉas la fariseon, kiu invitis Lin, sed ne akceptis Lin per la kutimaj afablaj gestoj. Li, la ulo plej proksima al Dio, ne estis afabla al Jesuo laŭ la tradicio. La ino, la plej malproksima de Dio, unue ĉar ino kaj due ĉar pekulino, Lin akceptis per la tri simbolaj gestoj montrantaj respekton al la gasto: la propono de la akvo, simbolo de akcepto, la kiso, simbolo de bonveno, la parfumo sur la kapo, simbolo de honoro.

Neniun el tiuj gestoj faris la Fariseo por Jesuo, male kompare kun la ino, kiu ilin plenumis complete. Kaj tial Jesuo asertas: *Pro tio Mi diras al vi: ŝiaj pekoj estas multaj; sed ĉiuj estas pardonitaj, ĉar ŝi ege amis.*"

Kion intencas diri Jesuo? Ke ambaŭ, Simon kaj la ino, estas pardonitaj, sed nur ŝi konscias pri tiu amo kaj tion esprimas plenkore. "Poste Jesuo diris al ŝi: „Mi pardonas al vi viajn pekojn". Jesuo ne pardonas ŝin nun: li konfirmas, ke la pekoj de la pasinteco estas pardonitaj. Neeviteble, naskiĝas skandalo."Tiam tiuj, kiuj sidis ĉe la manĝo kun Li, komencis diri inter si: „Kiu Li (rimarku: ne estas citita Lia nomo), estas, ke Li eĉ pardonas pekojn?"

Kial ili diras tion? Ĉar la pekojn pardonas nur Dio. Sed ĝuste tion renversas Jesuo: tio, kion la religio opinias sakrilegio (nepura virino tuŝis viron: de tiaj inoj oni devis resti almenaŭ du metrojn malproksime), por Jesuo estas esprimo de kredo "Sed Jesuo diris al la virino: „Via kredo savis vin: iru en paco!". Ne sekvas puno, nek riproĉo, sed beno. Estas skandalo,

ke Jesuo ne admonas la virino, kiel Li faros kun la adultulino: *"Iru, kaj de nun ne plu peku"* (Joh 8,11).

Pri tiu virino ne plu parolas la evangelioj. La hodiaŭa evangelio finiĝas tiel ĉi: *"Kaj post nelonge Jesuo vojradis tra urboj kaj vilaĝoj, predikante kaj anoncante la ĝojan mesaĝon de la regno de Dio. Estis kun Li la dek du disĉiploj, kaj iuj virinoj."* Ĉeesto de virinoj kun la disĉiploj estis io tute nekutima en tiu tempo. Oni povas supozi, ke per tiu konkludo Luko aludis, ke ankaŭ la "pekulino" apartenis al tiu grupeto.